

Semiotikaj konsideroj pri “Zozo”, la dek-sepa regulo de la fundamento, metalingva fabelo de Louis Beaucaire

JOZEFO LEIÇ*

Analizo de la rakonto *Zozo, la dek-sepa regulo de la Fundamento* de Louis Beaucaire laŭ la semiotika metodo de Algirdas Julius Greimas. En la fundamenta semantiko la rakonto strukturiĝas sur la dikotomio naturo/kulturo. La rakonta fundamenta nivelo montras, ke la kulturo estas pozitiva kaj la naturo estas negativa. Je la diskursiva nivelo, sub la metalingva figurativigo, la plej signifaj temoj estas la jenaj: metalingva, movada, genra, onomastika, biblia. Kontraste al la moderna emo al metalingvo konserviĝas tradiciema fono, inkluzive vireca. Tamen tiaj reakciaĵoj povas reprezenti ironian kaj ŝercan rimedon por malkaŝi la tradiciemon kadre de Esperanto-movado.

Kapvortoj: *semiotiko, diskursiva analizo, esperanta literaturo, fabelo*

1 Celo de la artikolo

Tiu ĉi artikolo celas analizi la rakonton *Zozo, la dek-sepa regulo de la Fundamento*, de Louis Beaucaire¹ laŭ la semiotika metodo de Algirdas Julius Greimas.

La elektita rakonto miksas la kulturan heredaĵon de la fabelo al la moderna prozo. El la pratempa fabelo konserviĝas la fono edifa [4]. De la nuntempa arto notindas la metalingva intenco de la diskurso [2, 3], rekonebla ĉi tie sub la fikcia masko de la roluloj.


Sed, ĉu la moderna emo al la metalingvaĵo koincidas kun renovigo de la tradicia fono de la fabeloj? Jen la problemo sur kiu disvolviĝas ĉi tiu esploraĵo.

2 Resumo de la rakonto

Resume la rakonto estas la interveno de Zozo, ina figuro, kiu prezentas sin kiel alternativan dek-sepan regulon de la Fundamento al la naivaj koleginaj, s-rinoj Regulunu ĝis Reguldekses. Zozo profitas la maleston de la prezidanto de la Akademio de Esperanto, S-ro Lavojo, tiam resaniĝanta en sanatorio. Per ruza argumentado ŝi persvadas la aliajn regulojn akcepti ŝin kiel la dek-sepan regulon. Por pravigi sian argumenton,

*José Leite de Oliveira Junior, <http://lattes.cnpq.br/1037793897092173>

¹Beucaire, L. Fabeloj de la verda pigo. Antverpeno: La Laguna: TK ; Stafeto, 1981. Ĉi tiu analizo baziĝas sur la mallongigita versio de KOLKER (2005, p.175-7), disponebla en la suba apendico aŭ rete en <http://www.esperanto.mv.ru/Vojagxo/zozo.html>.



Bildo 1: Semiotika dikotomio: kategorio naturo/kulturo

Zozo eksplikas, ke ŝi funkcius same kiel ĵokero en ludkarto. Ekzemple, se oni forĝas la vorton "ombrello", oni povas diri "Kiam pluvas, mi prenas mian zozon". Ĉar konstatablas, ke la reguloj ne rajtas esti pli ol dek ses, Zozo proponas anstataŭi la lokon de s-rino Regulaŭ, ĉar laŭ Zozo la naŭa regulo havas sensignifan rolon en de la Fundamento. La aliaj reguloj konsentas kun la novulino, escepte kompreneble de s-rino Regulaŭ. Sekve de la reforma decido eldoniĝas nova regularo. Konsekvence ekestas ĥaoso pro malklareco de esprimo inter la uzantoj de Esperanto. Tamen fine Regulaŭ sukcesas kontakti kun akademiano d-ro Lavojo. Li revenas al la Fundamento kaj alvokas kunvenon, en kiu li kolere riproĉas la perfidon de la reguloj kaj fine forpelas la fremdan Zozo.


3 Fundamenta semantika strukturo

La teksto de la elektita rakonto disvolviĝas ekde la antagonismo inter *permeso* kaj *malpermeso*. Alivorte tiu opono konstruiĝas sur la fundamenta akso de la kategorio *naturo/kulturo* (vd. bildo 1), duopo elprenita el la antropologio de Lévi-Strauss [2].

La termino *kulturo* rilatas al la reguleco, kontrolo kaj observado de la sociaj konvencioj. Kontraste *naturo* indikas malregulecon, liberecon kaj malobeemon al tiaj principoj. La pozitiva aŭ negativa senco de tiu dikotomio dependas de la specifa kunteksto de uzo. Tial la ideo de *naturo* ne ĉiam signifas pozitivan valoron kaj tiu de *kulturo* ne ĉiam aperas kiel io negativa. En la elektita fabelo, ekzemple *naturo* ligiĝas ĝuste al la negativa senco de lingva ĥaoso kaj siavice *kulturo* al la defendo de la Fundamento de Esperanto.

4 Fundamenta rakonta sintakso

La teksto de la fabelo estas supraĵa aperiĝo, kiu baziĝas sur du kontraŭaj transformoj. La suba semiotika kvadrato resumas ambaŭ kontraŭajn movojn. Laŭ la rakonto, la ago de Zozo ilustras la itineron *kulturo* → *ne-kulturo* → *naturo*; aliflanke la reago de d-ro Lavojo moviĝas male, tio estas laŭ la sinsekvo *naturo* → *ne-naturo* → *kulturo* (vd. bildo 1).



Bildo 2: Semiotika kvadrato pri la fundamenta sintakso [2]

5 Diskursiva semantiko²

Je la nivelo de la diskursiva semantiko konstruiĝas temoj kaj figuroj [2]. Temo estas abstrakta kategorio, sur kiu konstruiĝas figuro. Siaflanke figuro³ estas la rekonebla reprezento de la realo aŭ de la imago celanta kredigi realecon je la nivelo de la manifestado (teksto mem) [2]. Do ekzemplas figurojn ne nur la referencoj al spaco, tempo, ago, objektoj, bestoj kaj homoj, sed ankaŭ la rakonta voĉo mem pere de priskriboj, dialogoj, leksika elekto.

En la elektita fabelo figuroj kiel f-inoj Regulunu ĝis Reguldekses, d-ro Lavojo, la Fundamento (figure prezentita kiel impona konstruaĵo) rilatas al la metalingva temo Esperanto. Kelkaj figuroj povas ligi sin al aliaj temoj, kiel la temo de la perfido kaj puno.

Kelkajn temojn eblas rekoni per la persisto de semantikaj trajtoj laŭlonge de la rakonto (izotopioj⁴). Por la analizo elektiĝis la jenaj temoj: metalingva, movada, genra (seksa), onomastika, biblia. La motivo de la elekto estas, ke ili montriĝis la plej signifaj en la ekonomio de teksto, semiotika mikro-universo de ĉi tiu esploro.

La plej evidenta temo estas la metalingva. Jam de la dua sintaksa termino de la titola frazo, tio estas la epiteto "la dek-sepa regulo de la Fundamento", laŭlonge la teksto kolektas signifan kvanton da leksikaĵoj koncernantaj la lingvan temon, kiel ekzemplas la jenaj: "regulo", "Fundamento", "lingvo Esperanto", "radikon zoz-", "Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita".

La movadan temon, parencon al la metalingva, indikas leksikaj unuoj kun tradicia aŭ kolektiva sencoj kiel "Akademio", "Zamenhof", "kunveno". Aparte rimarkinda ĉi-rilate estas la uzo de la poseda pronomo "nia", kio malkaŝas la alparolanton de la rakonto, kiu estas la formaligo de la alparolo sendita al la alparolato, kaj je la diskursiva kaj je la manifestacia niveloj de la generado de la signifo: "unu el la plej tumultaj momentoj en nia historio".

²El la franca *sémantique discursive* [2]

³Semiotike figuro ne konfuziĝu kun retorika figuro aŭ tropo, kiel metaforo kaj metonimio.

⁴El la franca *isotopie* [2]


La genran temon eblas rekoni per pluraj leksikaj unuoj. Ĉiuj reguloj figuriĝas kiel inaj kaj fraŭlaj, ekzemple “f-ino Regultri”. En la vira flanko troviĝas ekzemploj kiel “Zamenhof”, “d-ro Lavojo”, “presisto”, “policisto”, “prezidanto”. Rimarkindas la trovaĵo, ke la malobeo ligiĝas al inaj kaj junaj figuroj, sed la zorga defendo de la normo ligiĝas al viraj figuroj, nome “Zamenhof”, “patro” kaj la “prezidanto” de la Akademio. Se oni konsideras, ke la rakonto pozitivigas la terminon *kulturo* (ordo) kaj negativigas la ĉi ties kontraŭan *naturu* (ĥaoson), ne eblas nei la virecan favoron de la subteksto.

La onomastikan temon, krom Zamenhof, ilustras la nomoj de la ĉefroluloj – f-inoj Regulunu ĝis Reguldekses, Zozo kaj d-ro Lavojo. La reguloj estas kunmetaĵoj de substantivo plus numeralo; la akademiano ricevis kiel nomon la titolon de fama metapomo de Zamenhof ankaŭ per kunmeto, ĉi-foje de artikolo kaj substantivo. La nomo Zozo estas hipokoristiko formita per la duobligo de la silabo -zo. La duobligo troviĝas en la akronima mallongigo L.L. (Lazaro Ludoviko). Ne hazarde la uzo de literoj de la familia nomo kaj de duobligo inspirita el la persona la nomo de Zamenhof estas ironia, ĉar la fremda regulo tute ne estas zamenhofa, sed neologisma mistifikaĵo. Paralele la duobligita silabo “-zo” ligiĝas al la sufikso “-um”, sen difinita senco, kiu havas ĵokeran funkcion en Esperanto.

La biblia temo aperas metafore (analogie). Zamenhof gajnas diecan trajton kiel patro de la reguloj, do semiotike kiel destinanto. La Fundamento bildiĝas kiel templo, kie la fraŭlinoj – do virgulinoj – funkcias kiel sacerdotinoj. La prezidanto de la Akademio (eklezio) havas episkopan karakterizon, ĉar li zorgas pri regularo (ordonoj de Dio), administras la templon (tabernaklon) kaj estras la sacerdotinojn (klerikaron). La “katastrofa situacio” de la malordo estas evidente infera. Zozo diable manipulas per tento (pretekste de la libereco) kaj trompe faligas la regulojn en pekon. Eksciinte la katastrofon, la okuloj de d-ro Lavojo figure “fulmis”. Dum la kunsido la “prezidanta voĉo tondris kaj tremigis la murojn”. Fakte la sintakso de la rakonto estas ia re-ligo, kio memorigas unu el la etimologiaj hipotezoj por la vorto *religio*⁵. La ĥaosa situacio kondensiĝas per la biblia vorto “Babelo”. La forpelo de Zozo ligiĝas al la praktiko de la ekskomuniko, se ne al la kondamno de la ribelema Lucifero. La herezia verko estas sendita al la brulado ĝuste dum la Librotago, kio aktualigas la aŭtodafeon, sed unu ekzemplero de la apokrifa verko konserviĝas en la indekso de mistera ekskanona sektoro ne de la biblioteko de Vatikano, sed ja de la analogia “Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno”.

La diversaj temoj interplektiĝas en semiotika reto. Jen kelkaj evidentoj pri tia plektaĵo. La biblia kaj la seksa temoj havas komunan punkton, ekzemple en la ligo inter virino kaj peko – ekde la prapeko –, kio iamaniere reaperas en la fabelo. Inter la temo de la movado kaj de la sekso ankaŭ restus rimarkindaĵo. Enmovade la dek-sepa regulo ŝerce rilatas al la onidiro, ke edzino de esperantisto ĝenerale ne ŝatas Esperanton. Ĉu la dek-sepa regulo de la fabelo estas kriptografiaĵo pri tio? Eble tiu hipotezo restos senresponda, almenaŭ se vidata en la semiotikaj limoj de la teksto. Aliaj tekstoj ŝajne ripetas tiun plendon alparolatan de vira voĉo. Ekzemple, en la soneto *Al mia amatino*

⁵Laŭ Lucius Caelius Firmianus Lactantius, religio, -onis rilatas al religare (religi).



Bildo 3: Modelo de la mitikaj agantoj (aktantoj)¹⁰ [2]

neesperantista, William Auld⁶ [1], riskas la hipotezon de ĵaluzo por tia malestimo: "Pri l' lingvo sentas vi ĵaluzotaŭzon, / ke mian amon vi kun ĝi dividis!" Alia citinda ekzemplo venas el la satira vervo de Schwartz⁷ [5] Tiel tekstas la epilogo de la poemo *Esperantisto, ekesto kaj malapero*: "Edzino: / FINO!"⁸

6 Diskursiva sintakso⁹

La rakonto – eĉ pro tio, ke ĝi aktualigas tradician fabelon – havas klaran mitan modelon, kies skemo videblas en bildo 3. Je la nivelo de la rakonto la destinanto¹¹ aperas sub la figuro de Zamenhof kaj la destinaton¹² bildigas la fraŭlinoj (reguloj). La funkcio de d-ro Lavojo estas proponi kaj sankcii kontrakton, laŭ kiu la subjekto (destinantoj) havas kiel programon la tasko zorgi pri la objekto [6]:

Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi kaj por ke ĝi havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj, – estas plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo: la ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla Fundamento de la lingvo.

Tiel la stabila komenca stato rompiĝas. La decidon forlasi la Fundamenton manipulis f-ino Regultri. Profitante la forlason de d-ro Lavojo (kulturo), la reguloj decidas promeni (natura). La persvado fariĝas per tento (propono de valoraĵo): "Ni profitu lian maleston kaj ĝuu la liberecon!" Tiel agante, ŝanĝiĝas kultura valoraĵo (ĉeesto en la Fundamento) al natura valoraĵo (libereco). Tamen libereco ne signifas ĉiokaze pozitivan konsideron. Ĉu pro perfido (ili profitas la maleston de S-ro Lavojo), ĉu pro maldiligenteco (ili malobeas la antaŭan kontrakton) estiĝas negativa valoro, laŭ la programero

⁶http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Al_mia_amatino.html

⁷<http://kabareto.esperanto.cc/ero-verdkata1926.htm>


⁸Ambaŭ versaĵoj troviĝas en la apendico de ĉi tiu artikolo.

⁹El la franca sintaxe discursive [2]

¹⁰El la franca actant [2]. Ne temas pri la rulantoj, sed pri la bazaj abstraktaj funkcioj de modela rakonto (mita). En la diskursa plano tiuj agantoj ("aktantoj") gajnas karakterojn de homoj, bestoj, aĵoj, aferoj, ktp. Ekzemple, malsano, en la elektita fabelo, estas formo, kiun prenas aganta funkcio, kiu malhelpas alian aktanton, kiu en la diskursa plano aperas en la figuro de la prezidanto de la Akademio, d-ro Lavojo.

¹¹El la franca destinateur [2]

¹²El la franca destinataire [2]



Bildo 4: Semiotika kvadrato pri deontologiaj modaloj [2].


mallibereco → *ne-mallibereco* → *libereco*. La semiotika kvadrato en bildo 4 montras la kontraŭdirecon de la deontologiaj modaloj rilatantaj al la malobeo de la reguloj, nome la devojo de la reguloj samtempe neas la malpermeson kaj la preskribon.

7 Manipulado fare de Zozo

Dum la promenado “en la ĉirkaŭaĵo de la Fundamento” ili renkontas f-inon Zozo, “kiu afable salutis ilin”. La demando de Zozo al la “koleginoj” – “Kien vi iras?” – jam indikas la devojiĝon de la reguloj. Tiu ĉi “fremda” regulo volas aparteni al la Fundamento. Tiucele ŝi proponas unuan kontrakton: “Ho, mi bone konas la Fundamenton kaj volonte apartenus al ĝi.” Tiu frazo kuŝas sur pli abstrata modala strukturo, nome la kono kaj la volo, kiuj funkcias kiel modalaj kondiĉoj por la efektivigo de la kontrakto. Sed f-ino Regules kontraŭargumentas, tio estas ne akceptas la proponitan kontrakton: “Bedaŭrinde, ni rajtas esti nur dek ses, ne pli.” Alivorte Zozo volas ŝanĝi la Fundamenton kaj bone konas ĝin, sed ne povas ŝanĝi la staton de unueco de la regularo.

Pro la negativa konsidero Zozo pliakrigas sian retorikan strategion. Krom la afablecon de la unua kontakto, Zozo prezentas sian scipovon pri la Fundamento. Tuj poste, responde al la demando “Kion do vi kapablas fari?”, ŝi detaligas sian kompetentecon (la kapablon provizore helpi la parolanton en okazo de forgeso aŭ ne sufiĉa kono de radiko). Tamen nova rezisto al la preskaŭ aprobata kontrakto malebligas ties plenumon: “Ĉiuj aplaŭdis krom f-ino Reguldekses, kiu energie protestis”, ĉar ĉi tiu lasta regulo ne volis perdi sian ferman pozicion en la vico de la regularo: “Mi estu por ĉiam la lasta regulo de la Fundamento!”

Antaŭ la nova rezisto, ŝi proponas preni la lokon de ŝajne negravan regulon kaj “Ĉies rigardoj turnis sin al f-ino Regulaŭ”. Semiotike okazas polemiko, ĉar du subjektoj estus disputanta la saman objekton. Kompreneble venkis la ruza disputanto, kiu per spritaĵoj (“Zozo rikanis”) denove manipulis ilin ne pl uper tento, sed nun per provoko, subtaksante la valoron de la naŭa regulo (“Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita”)



Bildo 5: Semiotika kvadrato pri verdiktaj modaloj [2].

kaj eĉ dubante pri la aŭtoritateco de Zamenhof ("li estis verŝajne laca, kiam li inventis tiun superfluan regulon"). Ĉiĉoj la manipulado rezultis trafa: "Tiom da sprito tiel ridigis la ceterajn regulojn, ke ili senkompate forlasis f-inon Regulaŭ en angulo de arbaro kaj transdonis ŝian lokon al la fremda, senhonta regulo."

Per plia manipulado eldoniĝis la nova Fundamento: "Zozo persvadis siajn naivajn koleginojn tuj reiri en la urbon kaj komisii al presisto la eldonadon de nova Fundamento". Rezulte de tio ekestis antaŭvidebla ĥaosso en mallonga tempo inter la uzantoj de la Internacia Lingvo. La ĵokera radiko "zoz-" infektis la lingvon. Almenaŭ momente la malordo de la *natur*o superis la ekvilibron de la *kulturo*:

Kio baldaŭ okazis? Babelo inter la esperantistoj mem: la Lingvo Internacia, la plej klara lingvo en la mondo, fariĝis nenomebla ĵargonaĉo, terura galimatio, ankoraŭ pli nekomprenebla ol Volapuko.

Rezulte de ĉi tiu rakonta programero perdiĝis la originala stato de ligo kun la valor-aĵo klareco ("la plej klara lingvo") anstataŭita per ligo al la dubinda valor-aĵo libereco. Por emfazi la negativan econ de la nova stato, multobliĝas leksikaj unuoj kun negativa senco: "Babelo (...), nenomebla ĵargonaĉo, terura galimatio (...)." Ne mankis la mencio al la Volapuko, kiu jam de longe fariĝis sinonimo de lingva konfuzaĵo.

8 Sankcio fare de la akademiano

La reordigo estas la epilogo de la rakonto. Eksigita de la koleginoj, F-ino Regulaŭ denuncas al S-ro Lavojo la embarasan situacion. Tuj reveninte al la Fundamento, tiu akademiano reordigas la endanĝerigitan lingvon. Tiam okazas la senmaskigo de Zozo, kiu ŝajnis esti regulo sed vere ne estis, kio montriĝas kiel mensogo laŭ la verdiktaj modaloj sube prezentataj per la semiotika kvadrato en bildo 5.

Surbaze de tiu senmaskigo efektiviĝas la sankcio, en kiu Zozo estas energie forpelita fare de S-ro Lavojo. Aliaj formoj de la sama sankcio estas la bruligo de la ekzemploj de la “falsa Fundamento” (pli ĝuste dirite mensoga) okaze de la Librotago kaj la apartigo de nur unu el ili por la arkivo de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno (memoraĵo de la sankcio). Siavice la aliaj reguloj, krom F-ino Regulnaŭ, estis severe riproĉitaj de S-ro Lavojo. Fine la *kulturo* imponis al la *natur*o.

9 Konkludo

La elektita rakonto ekzemplas la adapton de la mitologia tradicio al la kultura universo de Esperanto. Kiel moderna fabelo, aro da metalingvaj figuroj konektas la praan rakonton al la moderna emo valorigi la uzon de la lingvo pretekste de la lingvo mem. Tion pruvas la metalingva leksikaro de la rakonto. Kiel metalingvo, tio estas, lingvo inter lingvoj, Esperanto prezentiĝas kiel figurativa eksterajo al pli abstrakta temaro, fono, kie eblas distingi valorojn. La konservemo kaj eĉ vireca vidpunkto de la subteksto ne mankas. Tamen tiaj reakciaj ingrediencoj ne nepre laŭlitere reprezentas la vidmanieron de la alparolanto, kiu povas ilin uzi ironie kaj ŝerce por malkaŝi la tradiciemon kadre de Esperanto-movado.

Bibliografio

- [1] W. Auld k.a. *Kvaropo*. La Laguna, 1952.
- [2] A. J. Greimas kaj J. Courtés. *Dicionário de Semiótica*. Contexto, São Paulo, 2008. ISBN: 978-85-7244-316-6.
- [3] R. Jakobson. *Linguística e comunicação*. 8. eld-o. Cultrix, São Paulo, 1975.
- [4] S. Johansson. *Edifa samideanaĵo*. URL: <http://esperanto.net/literaturo/novel/novlibr/verdpigrec.html>.
- [5] R. Schwartz. *Baza literatura krestomatia*. 3. eld-o. Volmos Benczik, Budapeŝto, 1986.
- [6] L.L. Zamenhof. *Fundamento de Esperanto: gramatiko, ekzercaro, universala vortaro*. Hachette, 1905. URL: <http://www.akademio-de-esperanto.org/fundamento/>.